

KURSOJ kaj renkontoj – COURS et rencontres

Université Populaire du Canton de Genève, 23 rue du Vuache,
1201, Genève (derrière le collège Voltaire)

Tél: 022 339 05 00 – Fax : 022 339 05 09

E-mail : info@upcge.ch – Site Internet : www.upcge.ch

Kotizo : SFr. 50.00 Kursoj : po SFr. 50.00 por unu kurso (jare)



La kursoj de Esperanto rekomencos komence de Oktobro (aliĝo en Septembro)
kaj okazos en : Ecole de Commerce de Genève, Nicolas-Bouvier, rue de Saint-
Jean 60, CH-1203 Genève, Tel.: 022 546 22 00.

Kaze ke vi ne scias kie i situi as, vi povas konsulti mapon i-tie :

mapo: <http://www.edu.ge.ch/po/bouvier/admin/plan2.html>

Nivelo I, marde de 18h00 ĝis 19h30

Nivelo II/III (gramatiko/ Konversacio), merkrede de 18h00 ĝis 19h30

Konversacio rondo "Claude Piron"

Ĉiun ĵaŭdon ekde la 12-a ĝis la 13-a horo

Maison de Quartier de Plainpalais, 1 rue de la Tour, 1205 Genève

Informoj/Informations : François Perret : 022 320 02 71

Ĝeneva grupo : Esperanto-Grupo La Stelo, Case postale 734, CH-1212 Grand
Lancy 1. Kontakto : S-ino Christiane Sixtus retpoŝte: ch.sixtus@bluewin.ch . La
grupo kunvenas ĉiun unuan mardon de la monato en la Maison des Associations,
15 rue des Savoises, Salle Jacquard, je la 20-a horo (konfirminde).

Laŭzana grupo : Laŭzana Esperanto Societo, Case postale 246 – CH-1000
Lausanne 22. Tel. 021-729 58 02 Interete : www.alawa.ch/les
Renkontoj ĉiun unuan lundon de la monato je la 20-horo en la Bufedo de la
Stacidomo.

CDELI – La Chaux-de-Fonds

Sabataj stud-aranĝoj

Didaktikaj stud-sabatoj : la trian sabaton de la monato
por ĉiuj esperanto-lernantoj.

Kulturaj seminarioj : la unuan sabaton de la monato
celas kleriĝon koncerne al la historio kaj literaturo de esperanto

de la 10-a matene ĝis la 17-a posttagmeze

Aliĝo : Nancy Fontannaz, telefone 021 728 31 27 au rete :
nancyfontannaz@freesurf.ch.

Partopren-kotizo : SF 15 (stud-sabato), SF 20 (seminario)

Adreso: Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP. 3034,
2303 La Chaux-de-Fonds

Tel: 032 967 68 42, retadreso : claude.gacond@ne.ch

ANNECY, France

Annecy Esperanto

Responsable: Rolande HUDRY – 5 av. de Barral

74960 SEYNOD – Tél. 04 50 51 06 29

Les cours ont lieu le mercredi à partir de 16 h. – Salle Jumel – Quai des Clarisses
(à côté de la Croix-Rouge).



Asocio
Espéranto - Genève - Régions
www.esperanto-geneve-regions.info

LIMSALTANTA FOLIO

No. 3, 2009

La asocio Esperanto-Genève-Régions estas translima asocio kiu celas krei ligojn
inter grupoj de Esperantistoj en Pays de Gex, Lago Lemano, Rodanalpo kaj Ĝenevo,
inter aliaj.

**La Asocio organizas babilan rondon, La Lunda Grupo, ĉiun lundon ekde la 18-a
horo ĉe la "Brasserie aux Cheminots", 7 rue des Gares, malantaŭ la stacidomo
Cornavin en Ĝenevo (apud la Poŝtoŝejo Montbrillant).**

**En ĉi-tiu numero : Asocia agado, poŝtelefonoj, stratripurado, poezio,
ŝerco, birdnomoj**

Tiuj kiuj deziras, povas kontribui simblan sumon al Asocio EGR de € 3.00 aŭ SFr 5.00
(jare) – donacoj ankaŭ bonvenas! Por membriĝi, nur demandu kaj vi ricevos membro-
karton. Por informoj, vizitu nian retpaĝaron :

www.esperanto-geneve-regions.info

Il y a des pages en français! – There are pages in English!

aŭ kontakti nin

retpoŝte : charmian@aliceadsl.fr aŭ mariezoesp@hotmail.com

telefone : Charmian +33 (0)450 422 802 aŭ Marie +33 (0)450 421 956 kaj en Ĝenevo :
Laure 0768 614836

Poŝtadreso : 36 parc du Bugnon, 01630 St Genis-Pouilly, Francio

Kontoj (Svisa Poŝtobanko CCP): 17-207679-3

Ĉekoj : Association Espéranto-Genève-Régions

Por informoj pri la Suisa Esperanto Socio : www.esperanto.to/ses

Kunprezidantoj: Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets

Tel: 032 932 18 88 Retpoŝto : mireille-grosjean@rpn.ch

Dietrich Weidmann, PF 301, 8034 Zürich, Tel: 044 251 50 25
info@esperanto.ch

kaj Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris

www.esperanto-france.org info@esperanto-france.org

*Ni kore dankas niajn membrojn kaj geamikojn por ilia subteno.
Nous remercions chaleureusement nos membres et amis pour leur soutien.
We warmly thank our members and friends for their support.*

Asocia agado

Ĝeneva printempo 2009

La Chataigneraie, 20-a de marto 2009

Post teatrumaĵi en januaro 2009 (jam raportita), Ĝenevaj esperantistoj estis invitataj, ĉi-foje kiel reprezentantoj/membroj de UEA, prezenti Esperanton en la Internacia Lernejo de Ĝenevo. La invitanto estas Sinjorino Eva Dimkovski, instruistino ĉe la Internacia Lernejo kaj ankaŭ fratino de Esperantisto. Temis pri la centjariĝo de unu el la domoj de la ampleksa lernejo – La Chataigneraie – kaj ili ankaŭ festis la unuan tagon de la Semajno de Francparolantaro, vendredon la 20-an de marto. Estis grava okazaĵo por ni, ĉar vere estas tutmonda internacia lernejo kun lernantoj kies familioj venas de ĉiuj anguloj de la mondo.

La tago estis brile suna sed forta bizo ventumis – do la temperaturo estis frosta ! Tamen, ni (Stefano Keller, Georgette Friedly kaj Charmian Common) sukcesis alveni antaŭ la 9-a matene kaj Stefano Keller (ĉef-representanto de UEA ĉe Uniĝintaj Nacioj) bonege prezentis Esperanton (*vidu fotojn 1 kaj 2*), kun iom da historio (mi ankaŭ legis tekston prie en la angla), tre plaĉa filmeto kiun li mem kunmetis, montrante kiel homoj inter-renkontiĝas pere de Esperanto, ekzemple Universalaj Kongresoj, kaj ĝi ankaŭ aŭdigas modernajn muzik-grupojn. Li tuj instigis partoprenon de la lernantoj – ili multe aprezis tion, kaj rapide komprenis la diferencon inter "knabo" kaj "knabino" – kaj ankaŭ la similecon! Domaĝe ke ni ne havis pli da tempo – nur 45 minutojn. Treege impresiga estis la granda atento de la lernantoj – ni eĉ ne havis la tempon diri al ili bonvolu preni broŝurojn – estis kvazaŭ svarmo de lokustoj kiu forprenis ĉion !

La LibroFairo de Ĝenevo, de la 22-a ĝis la 26-a de aprilo 2009

Nia Asocio EGR denove starigis belan budon ĉe la Ĝeneva LibroFairo 2009, kvankam malgranda ĝi estis bone aranĝigita, kun riĉa informilaro – afiŝoj, broŝuroj, libroj ... kaj ludo ! (*vidu foton 3*) Ni denove faris traduk-ekzercon ĉi-jare, la frazo estis iom pli malfacile : "Hodiaŭ mi iros al la urbo por aĉeti vestaĵojn. Mi havas nenion por surmeti." Ni kolektis malpli da lingvoj ĉi-jare (19), sed tamen kelkaj estis tre interesaj, ekzemple literatura araba belege skribita, kaj dialekto de Nendaz–valo kiun nia vizitanto enliterumis ĉar li diris ke ĝi baldaŭ malaperos kaj li volas konservi ĝin : "Ouey aouaré ĕn vĕa po ataetĕ de j'halon. En ôô pa mĕrin a me mettre." Ĉiam estas kontentiga kiam oni igas ilin legi la tekston, kaj ili komprenas ĝin post iom da pripensado.

Ni ne havis amasegon da vizitantoj, sed ili konstante fluetis preter nia budo kaj ricevis multajn inform-flugfoliojn. Ĉi-jare, ili ŝajne venis ĉe ni cele por informiĝi pri la kursoj, ili jam estis decidantaj eklerni Esperanton. Virino estis ravita malkovri Asterikson en Esperanto ! Ni estas feliĉaj povi kunligi homojn de diversaj urbetoj en apuda Francio – Albertville, Lons-le-Saulnier, Les Houches, St Claude. Tiel estas nia rolo, ĉu ne? Jaŭdon okazis debato pri Esperanto : Roberto Frey klarigis kiel Esperanto estas pli facile lernebla por ĉinuloj – li vizitis ĉinion

Plurlingva listo de konataj birdoj

Esperanto	Franca	Angla	Germana	Latina
Anaso	Canard	Duck	Ente	Anas ...
Ansero	Oie	Goose	Gans	Branta ..
Merlo	Merle noir	Blackbird	Amsel	Turdus merula
Nigraĉapa silvio	Fauvette à tête noire	Blackcap	Mönchsgrasmücke	Sylvia atricapilla
Monta fringo	Pinson du nord	Brambling	Bergfink	Fringilla montifringilla
Buteo	Buse variable	Buzzard	Mäusebusard	Buteo buteo
Ĉifĉafo	Pouillot vélocé	Chiffchaff	Zilpzalp (Weidenlaubsänger)	Phylloscopus collybita
Kukolo	Coucou gris	Cuckoo	Kuckuck	Cuculus canorus
Reĝa aglo	Aigle royal	Golden eagle	Steinadler	Aquila chrysaetos
Fringedoj		Finches		
Pirola	Bouvreuil pivoine	Bullfinch	Gimpel	Pyrrhula pyrrhula
Fringo	Pinson des arbres	Chaffinch	Buchfink	Fringilla coelebs
Kardelo	Chardonneret	Goldfinch	Stieglitz	Carduelis carduelis
Verda fringo	Verdier	Greenfinch	Grünlings (Grünfink)	Carduelis chloris
Kernrompulo	Gros-bec	Hawfinch	Kernbeisser	Coccothraustes coccothraustes
Mevo	Mouette	Gull	Möwe	Larus ...
Akciptiro	Autour, épervier	Hawk	Falke	Accipiter ...
Alciono	Martin-pêcheur	Kingfisher	Eisvogel	Alcedo atthis
Alaŭdo	Alouette	Lark	Lerche	Alauda, Lullula, Eremophila
Pigo	Pie bavarde	Magpie	Elstwer	Pica pica
Hirundo	Hirondelle	Martin	Schwalbe	Delichon, Riparia
Najtingalo	Rossignol	Nightingale	Nachtigall	Luscinia megarhynchos
Sito	Sittelle torchepot	Nuthatch	Kleiber	Sitta europaea
Strigo	Hibou, chouette	Owl	Ohreule	Tyto, Athene, Asio, Strix
Paruoj	Mésanges	Tits	Meisen	Panurus, Parus
Barba paruo	Mésange à moustache	Bearded tit	Bartmeise	Panurus biarmicus
Blua paruo	Mésange bleue	Blue tit	Blaumeise	Parus caeruleus
Nigra paruo	Mésange noire	Coal tit	Tannenmeise	Parus ater
Tufparuo	Mésange huppée	Crested tit	Haubenmeise	Parus cristatus
Granda paruo	Mésange charbonnière	Great tit	Kohlmeise	Parus major
Longvosta paruo	Mésange à longue queue	Longtailed tit	Schwanzmeise	Aegithalos caudatus
Foliara paruo	Mésange nonnette	Marsh tit	Sumpfmeise	Parus palustris
Salika paruo	Mésange boréale	Willow tit	Weidenmeise	Parus montanus
Certio (longfingra)	Grimpereau des bois	Treecreeper	Waldbaumläufer	Certhia familiaris
Motacilo	Bergeronnette	Wagtail	Stelze	Motacilla ...
Troglodito	Troglodyte	Wren	Zaunkönig	Troglodytes troglodytes

El Nomaro de Britaj Birdoj Eksterdomaj, kompilita de Edward Ockey, 1986

La Bona Lingvo

Jean de La Fontaine

La Cigale et la Fourmi La Cikado kaj la Formiko

(Tradukis Mad Mevo)

Kantis la Cikado sen ĉes'
Dum varmec',
Sed sen manĝo jam sin trovis
Kiam bizo ĵus alvenis:
Plu neniu eta pec'
De muŝ' au sama spec'.
Iris ĝi kriegi malsate
Ĉe la Formik' iom flate,
Kun la pet' pri ajna gren'
Por manĝi ĝis la reven'
De pli favora sezono.
« Mi pagos al vi per mono
Aŭguste, fid' d' animal'
Interazon kun total' »
Ne donema, la Formiko:
Jen ĝia eta malĉarm'.
« Kion vi faris dum varm' ? »
Diris ĝi en mir', kritiko.
« Tagnokte por la pasanto,
Kantis mi sen halt' nek pun'. »
« Ĉirpis vi, jen plaĉa kanto,
Nu do! dancu ek de nun. »

La Cigale ayant chanté
Tout l'été,
Se trouva fort dépourvue
Quand la bise fut venue :
Pas un seul petit morceau
De mouche ou de vermisseau.
Elle alla crier famine
Chez la Fourmi sa voisine,
La priant de lui prêter
Quelques grains pour subsister
Jusqu'à la saison nouvelle.
« Je vous paierai, lui dit-elle,
Avant l'août, foi d'animal,
Intérêt et principal. »
La Fourmi n'est pas prêteuse :
C'est là son moindre défaut.
« Que faisiez-vous au temps
chaud ? »
Dit-elle à cette emprunteuse.
« Nuit et jour à tout venant
Je chantais, ne vous déplaie. »
« Vous chantiez ? j'en suis fort
aise :
Eh bien ! dansez maintenant. »

Sur la plaĝo.

- Vidu, kia bela knabo staras tie.
- Tio estas ne knabo, sed knabino.
- Ne, tio certe estas knabo.
- Tute ne knabo. Ŝi ja estas mia filino.
- Ĉu? Do vi estas ŝia patro, ĉu?
- Ne, mi estas ŝia patrino. (el Lernu.net)

kaj lernis iom da mandareno. Li citis kiel ekzemplo la vorton "ekster-land-an-o" kaj diris la saman en la mandarena, demonstrante ke la strukturo de la vorto estas precize la sama en la ĉina lingvo.

La Foiro estis plena je amuzaĵoj – ekzemple, la budo de minilibroj – ĝi furoris ! la libretoj mezuris 3 x 2 centimetrojn kaj enhavis verajn tekstojn, eĉ estis vortareto franca- Esperanto ! Ĉe la budo de natur-revuo Salamandre, ĉeestis rano, tritonoj, kapuloj (antaŭ-ranidoj) kaj abelujo. Aliaj belaĵoj estis ekspozicio pri Boris Vian, la Afrika budo, la Turka budo, la gasto de la Foiro ĉi-jare, kaj ĝia furora donaco – rul-sako farita el cartonaj skatoloj, estis nepre havenda! La temo de la granda art-ekspozicio ĉi-jare estis Familio Giacometti – tre interesa ekspozicio kiu montris ne nur skulptaĵojn, sed ankaŭ belajn pentraĵojn.

La Alternativa Vilaĝo montris multajn interesajn kaj pensigajn filmojn pri sia temo "La financa krizo : ĉu tutmonda manipulado ?" kaj okazis pluraj debatoj tiuteme. Ho ve, kiam oni deĵoras, oni ne povas ĉion partopreni!

Mi dankas al niaj kuraĝaj deĵorantoj, dank' al kiuj ni almenaŭ povis gustumi kelkajn frandaĵojn de la Foiro – kaj apartan dankon al Jean-Loup Gaudin kiu ĉiam helpas nin konstrui kaj malkonstrui nian budon.

Charmian Common kaj Marie Zoller

<http://www.esperanto-geneve-regions.info>

Lunde : Brasserie aux Cheminots, Genève, ekde la 18-a horo



La angulo de Didier

NE PORTEBLAS LA PORTEBLA TELEFONO

Por mia emeritiĝo kiel donaco al mi mem, dum la Kristnasksezono de pasintjaro mi pensis fari bonan aferon aĉetante senpagan porteblan telefonon. Fakte, estis pagenda abono po 25 frankoj monate dum unu jaro ; senpagaj estis la telefono mem, kaj ankaŭ la « simo » karto. Profitenda afero ĉu ne ?

Sed kelkaj monatoj poste, mi devis pagi 400 frankojn por aferoj nekonataj de mi « GPRS roaming » kaj « Internet mobile » (« Interreta poŝtelefono ? »), tamen mi neniam uzis GPS-on kaj neniam interreton per mia poŝtelefono. Mi plendis skribe, kaj ili akceptis kompromison se mi pagos la duonon. Do mi pagis 200 frankojn, ĉar proceso plikostus. La malamikeco de tiu aĵo ne finis tiam. Ekde la unua de marto tiu « superteknika » telefono kredis ke la jaro 2009 estis superjara kaj aŝŝas la daton de la hieraŭa tago. Sed mi ne scias kiel ŝanĝi la daton sur tiu novaĵo ĉar la uzindikoj klarigas nenion pri tio. Krome mi uzas tiun telefonon kiel vekhorloĝon. Dimanĉon matene la 29-an de marto mi programis ĝin por la 8-a kaj kvarono ĉar mi devis veturi for. Tiun tagon ĉio bonordis. Mi eĉ feliĉis ĉar mi ne plu ŝanĝas la horon de mia brakhorloĝo al la somerhoro lastdimanĉe de marto ekde multaj jaroj. SED ... la sekvantan tagon, ĝi faris kontraŭ mi la plej malagrablan alfronton : ĝi vekis min je unu horo pli frue! Mi neniam petis ĝin ke ĝi ŝanĝu al somera horo tiun lundon kiun ĝi aŝŝas kiel dimanĉo! Mi do kuntrenas poŝtelefonon kiu aŝŝas nek la bonan tagon nek la bonan horon.

Kiu diris ke emeritiĝo estus trankvile fluanta rivero ?

Esperanta akrostiko

Esperanto estas lingvo
Simpla por kiu motivo
Povas kuraĝigi lerni
Ekzempladone kaj koni
Realecon tre vivantan
Al ĉiuj kaj utilecon
Nature tiun kreadon
Tiel faman paroladon
Oni povas ĉie uzi.
Ne necesas parafrazi

Metaforojn por paroli
Inter homoj kaj babili.

Al via spirito tuŝos
Mirinda ĝia klareco,
Ankaŭ l'amo kaj la paco
Sekvos do al ĉiuj plaĉos.

La maljunuloj kaj la telefonaj operatoroj: NENIU MALFACILAS

"Ni faciligas la funkciojn de telefonoj por reteni nur la plej necesajn. La plej aĝaj volas voki, sendi kaj ricevi SMS-ojn, posedi repertuaron kaj funkcion de vekhorloĝo. Kontraŭe, ili ne volas ludojn aŭ MP3-ojn kiuj malfaciligas la menuojn kaj la manipuladojn," klarigas Jérôme Arnaud, PDG de Doro. Se 50% de pli ol 65 jaraĝaj francoj posedas poŝtelefonon, 70% el tiuj malŝatas ĝin, laŭ studo farita de kabineto Synovate. Ĉe la pli ol 65 jaraĝaj, 90% estas presbiopaj, 30% havas malkreskantan aŭdadon, 42% havas problemojn pri manlerteco kaj 46% ne fluantas pri la tekniko. Tiom multe da specialaĵoj al kiuj Doro endas atenti pri novaj produktoj.

(Traduko de artikolo en LE FIGARO)

Ni estas grupo de novaj esperantistoj, do eblas ke ni foje faras erarojn. Ni estos dankemaj se vi bonvolus atentigi nin prie!

Stratiparado

Don Lord (el La Brita Esperantista, Nov/Dec 1997)

"Mi bedaŭras, ke mi estas malfrua, sed la ĉefstrato en la vilaĝo estas elfosata. Kial?"

"La magistrato ne scias kiel elspezi la komunuman imposton, do ĝi inventas ĉiam novajn laborojn."

"Vi blagas."

"Ĉu? Evidente vi ne scias, ke la pasintan jaron la magistrato konstruigis du trafikcirklojn kaj post dek monatoj malkonstruigis ilin."

"Kial?"

"Ĉar iu magistratano proponis, ke pli bone estos, se en la ĉefstrato ni havos unudirektan sistemon - sen vojcircloj - kaj la aliaj magistratanoj konsentis. Ĉu la ĉefstrato estas plenŝtopita? Ĉio estis en ordo antaŭ tri tagoj."

"Trovigas bariloj kontraŭ la trafiko, sed tiuj estas nebezonataj. La elkavatoroj kaj ŝutkamionoj ŝtopas la vojon."

"Kiel do ni povas butikumi?"

"La trotuaroj restas neŝtopitaj. Sed tie kaj tie troviĝas rubkonteneroj, kaj oni devas superpaŝi la kablojn de la pneŭmataj vojboriloj."

"Kiel vi vidis tion, se vi ne povis veturi laŭ la strato?"

"Nu, kiam mi ĝisvenis la barilon, mi elaŭtigis por demandi policiston, pri kiel mi povas atingi la ekstremon de la vilaĝo. La bruo de la vojboriloj kaj la betonmiksiloj estis granda. Ni preskaŭ ne povis aŭdi nin."

"Ĉu li diris, kiom longe la laborado daŭros?"

"Dum pluraj semajnoj. Kaj malhelpe estis, kiam unu laboristo frakasis elektro-ĉefdukton per sia pioĉo - li kuŝas nun en la hospitala fako por intensa flegado. Laŭ la policisto la pastro venis kun la krismo por celebri la sakramenton de la mortontoj. Sed tio ne estis la sola akcidento. Poste, elkavatoristo frakasis akvo-ĉefdukton."

"Diable! Ĉu oni dungis nur fuŝlaboristojn?"

"Verŝajne."

"Do, suposeble, la homo en la hospitalo mortos."

"Ne nepre. Vere, la esprimo 'sakramento de la mortontoj' estas malĝusta. Oni ŝmiras per krismo homojn severe malsanajn, ne nur tiujn, kiuj nepre mortos. Eble la krismo helpas resanigi la pacienton."

"Kia malsaneca temo! Ni parolu pri iu alia! Kio okazis al la trotuara kafejo, kie ni kaŝtrinkas post la butikumado?"

"Oni devos kaŝtrinki interne de la kafeja konstruaĵo por eviti la polvon kaj la bruon. Simile estas ĉe la florbutikoj, la fiŝvendistoj kaj la viandistoj. Ĉies eksteraj vendotabloj estas forigitaj. Oni devas eniri la butikon por esplori la varojn."

"Kaj kiom, mi demandas, estos la fina kosto de ĉio?"

"Kiu scias? La faroj de la magistrato restos por mi ĉiama mistero."

magistrato = loka registaro

krismo = sankta oleo

El "Conversational Esperanto - ĉiutaga Esperanto", de Don Lord (kolekto de artikoloj aperintaj en La Brita Esperantisto kaj EAB Ĉisdate, kun enkonduko de Marjorie Boulton en la angla, eldono EAB, havebla ĉie UEA)